

Johann Wolfgang von Goethe,
Roz' sur erikejo

tradukita de Konrad Matheus

Vidiĝis eta ruĝa roz'
de knab', sur erikejo.
Ĝi belis en matena ros'.
Hastis li al juna ŝos'
admiri ĝin kun ĝojego.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz',
roz' sur erikejo.

Diris knab': "Mi rompos vin,
rozo sur erikejo."
Diris roz': "Dorn' pikos vin,
por ke vi ne forgesu min.
Al mi ne estu sufero.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz',
roz' sur erikejo.

Kaj knab' sovaĝa romp'is ĝin,
rozon sur erikejo.
En defend' roz' pikis lin.
Sed ve' kaj aĥ' ne helpis ĝin.
Venis sort' sen tolero.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz',
roz' sur erikejo.

...

Johann Wolfgang von Goethe,
Dornrozeto

tradukita de Kálmán Kalocsay

Vidis knab': Jen, juna flor'!
Rozujet' kampara!
Bela, kiel la aŭror'!
Li alkuris ĝoje por
Vidi, kiel kara!
Rozo, rozo, ruĝa roz',
Rozujet' kampara.

Diris knab': Mi volas vin,
Rozujet' kampara.
Diris roz': Mi boras vin,
Ĉiam vi memoras min,
Pro l' dolor' amara.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
Rozujet' kampara.

Knabo rozon ŝiris do
De l' rozuj' kampara,
Ĝi, defende, pikis tro!
Sed ne helpis ve kaj ho
Kontraŭ vol' barbara.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
Rozujet' kampara.

...

Johann Wolfgang von Goethe,
Knab' rozeton vidis li

tradukita de Joachim Gießner

Knab' rozeton vidis li;
erikeja floro.
Juna, bela estis ĝi.
Por admiri kuris li
ĝoje kun adoro.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

Diris knab': „Mi rompos vin,
vi rozeta floro“.
Diris roz': „Mi pikos vin,
ke vi ne forgesos min,
premas min doloro.“
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

Knab' sovaĝa romp'is ĝin;
erikeja floro.
Rozo ja defendis sin
kaj sufere pikis lin,
ne utilis ploro.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

...

Johann Wolfgang von Goethe,
Heidenröslein

Sah ein Knab ein Röslein stehn,
Röslein auf der Heiden,
War so jung und morgenschön,
Lief er schnell, es nah zu sehn,
Sah's mit vielen Freuden.
Röslein, Röslein, Röslein rot,
Röslein auf der Heiden.

Knabe sprach: „Ich breche dich,
Röslein auf der Heiden!“
Röslein sprach: „Ich steche dich,
Dass du ewig denkst an mich,
Und ich will's nicht leiden.“
Röslein, Röslein, Röslein rot,
Röslein auf der Heiden.

Und der wilde Knabe brach
's Röslein auf der Heiden;
Röslein wehrte sich und stach,
Half ihm doch kein Weh und Ach,
Musst es eben leiden.
Röslein, Röslein, Röslein rot,
Röslein auf der Heiden.

...

Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de Konrad Matheus.

Arg-1022-2227 (2014-12-17 13:24:53)

S-ano Konrad Matheus loĝas en Mühlenweg 20, D-33038 Nieheim, Germanio.

Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kalocŝajo, *1911 – †1976).

Arg-1022-2226 (2014-12-16 16:56:40)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas interalie en <http://egalite.hu/kalocsay/eterna/dornrozeto.htm>.

Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).

Arg-1022-2225 (2014-12-16 16:29:14)

Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en <http://arkivo.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22).

Arg-1022-2069 (2014-05-23 13:04:27)

La poemo troviĝas en <http://de.wikipedia.org/wiki/Heidenröslein>. Melodioj estas aŭdeblaŭ en <http://ingeb.org/Lieder/saheinkn.html>. La plej konata Melodio estas tiu, kiun verkis Heinrich Werner. Pri tiu vidu la vikipediejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Werner_\(Komponist\)](http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Werner_(Komponist)).